

## ĈS. ESPERANTISTÉ ZA MÍR VE VIETNAMU A NA CELÉM SVĚTĚ

Mírová sekce Českého esperantského svazu spolu s esperantskými kroužky, kluby a skupinami ĈES uspořádala v uplynulých měsících pod záštitou ÚV ĈES kampaň "Ĉs. esperantisté bojujícímu Vietnamu". Kampaň byla vyhlášena v listopadu 1971 na počest 15. výročí vzniku Vietnamského esperantského svazu na obranu míru (VPEA). Její první část skončila v únoru a druhá v květnu tohoto roku.

Uspořádáním této významné politické akce se esperantisté a esperantské organizace v naší zemi důstojně angažovali v úsilí občanů a organizací na podporu lidu bojujícího za svobodu a nezávislost své země proti agresivním silám USA. Organizátoři kampaň sledovali od počátku tyto dva hlavní cíle :

- 1) Poskytnout politickou, morální a materiální pomoc vietnamskému lidu v jeho spravedlivém boji a tím vyjádřit tradiční internacionální cit a solidaritu k národu, který trpí bezprávím a nucenou válkou.
- 2) Zaktivizovat místní a závodní EK a dát jim možnost konkrétní spolupráce s ostatními společenskými a zájmovými organizacemi ; touto cestou pronikat do jejich řad. V tomto smyslu orientovala a vedla mírová sekce EK ve svých metodických a informačních materiálech. Současně vytvářela příznivé podmínky ke spoluúčasti některých orgánů NF, ROH, České mírové rady, krajských a okresních mírových rad, ONV aj.

Některé EK, jejichž funkcionáři mají organizační zkušenosti z práce v jiných organizacích, projevíly mimořádnou iniciativu a organizačskou schopnost: připravily dobré a někde velmi úspěšné veřejné akce - přednášky s filmy nebo světelnými obrazy, večery solidarity, besedy. Získaly ke spolupráci mnohé organizace a instituce v místě, závodě nebo okrese, například Okresní mírové rady, okresní či místní organizace NF, mezi nimi především SPB, SĈSP, ROH, ĈSŽ, KaSS, dále školy, osvětová střediska, knihovny, národní výbory... Jiné EK, s ohledem na omezenější možnosti, uspořádaly podobné akce v rámci svých klubovních večerů.

Žel, některé EK - a nebylo jich málo - nedokázaly připravit třeba jen drobnou akci s přednáškou, jejíž doslovný text v esperantském i českém znění nabídla mírová sekce všem EK bezplatně, s nabídkou diapásů, a ve svých informačních listech radila, jak získat vhodné filmy, výstavní materiál a v některých případech i řečníka.

Zde tedy nelze mluvit o nedostatku prostředků a nevhodnosti místních podmínek; vždyť organizace NF, školy, závodní organizace ROH jsou ve všech okresech, a mnohé z nich i v místech, a konání podobné akce by jistě uvítaly. Zde šlo buď o naprostý nezájem nebo ignorování akce výborem EK, nebo snad chyběla iniciativa či schopnost podniknout něco účelného pro naše přátele ve Vietnamu i v zájmu dobrého jména esperantského hnutí.

(dokončení na 6.str.)

# Významná iniciativa libereckých

Dohoda, kterou nedávno podepsali představitelé Okresního výboru Socialistického svazu mládeže v Liberci a tamní Klub esperantistů, místní skupina Českého esperantského svazu, poskytuje nové možnosti při rozšiřování mezinárodního jazyka esperanta v mládežnických organizacích a dává současně i návod k činnosti dalším esperantským kroužkům v ČSR.

Dohoda uzavřená rámcově na pět let stanoví, že OV SSM bude prostřednictvím svých orgánů propagovat esperanto v jednotlivých místních organizacích SSM a rozesílat jim v případě potřeby propagační materiál a učební pomůcky. V rámci školení funkcionářského aktivu seznámí funkcionáře SSM s významem tohoto jazyka a jeho použitelnosti ve stycích s mládeží socialistických a dalších zemí; jako prostředku pro šíření pokrokových myšlenek a upevnění socialistického internacionalismu.

Obě organizace se zavazují, že vypracují společný plán činnosti pro odbor mladých esperantistů a pro Koordinační komisi OV SSM, která bude dohlížet na plnění této rámcové dohody.

Tuto dohodu projednalo 12. července předsednictvo Českého esperantského svazu a její obsah velmi kladně zhodnotilo. (k)

## Rekomendo de laborkonferenco en Most

La reprezentantoj de EK en Ústí n.L., Most, Teplice, Litvínov kaj K.Vary kunvenis la 25-an de junio en Klubo de ministoj, Most ĉe la laborkonferenco. Diskutinte pri aktiveco kaj socia rolo de la EK, pri disvastigo de la Internacia Lingvo kaj ĝia instruado oni aprobis la rezolucion, el kiu ni citu:

- eduki anojn de niaj kluboj en la spirito de socialisma internaciismo kaj frata kunvivado de la nacioj de niaj frataj landoj kaj de amikeco kun progresemaj porpacaj fortoj en la tuta mondo;
- popularigi Esperanton per aktiva laboro, ne izolita de la socia vivo, aktive kunlabori kun organoj de Nacia Fronto kaj Paca Konsilantaro, kun Ligo de Socialisma Junularo kaj junpionira movado en nia distrikto;
- klopodi ligi kontaktojn kun E-kluboj aŭ kun esperantistoj el distriktoj en socialismaj landoj, kun kiuj havas niaj distriktaĵoj organoj amikecajn rilatojn kaj tiel helpi ilian ĝemeliĝon;
- proponi al la Pedagogia sekcio de ĈEA daŭrigi la prepar-laborojn por la eldono de lernolibro de Eo por infanoj kaj helpi al ĝia efektivigo;
- rekomendi al ĈEA plivastigon kaj pliintensigon de reciprokaj kontaktoj kun AE SSR kun la celo eluzadi bonajn spertojn kaj sukcesojn de la slovakaĵa esperantistoj;
- rekomendi al niaj kluboj aboni la organon de MEM "Paco" kaj utiligi ĝin en porpacaj aferoj; popularigi skribe kaj persone nian socialisman landon en la tuta mondo.

## Bulgara kongreso en Smoljan

En Smoljan, pitoreska ripozloko ĉe la piedo de Rodopa-montaro okazis inter la 2.-4.7. la 38-a kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio. En la traktadoj kaj la ceteraj arangoj oni unualoke rememoris la eminentan personecon de la internacia laborista movado, G.Dimitrov, kies 90-jaran naskiĝ-datrevenon festas nunjare la tuta progresema mondo.

Partoprenis ĉirkaŭ mil ducent bulgaraj esperantistoj kaj delegitoj el dek landoj (Sovetio, Vjetnamio, Pollando, Hunga-

rio, GDR, Jugoslavio, Francio, Nederlando, Britio kaj ĈSSR. Ili ĉeestis renkontiĝojn kun la funkciuloj de Patriota Fronto kaj amaskunvenon kun la loĝantoj.

En la nomo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Federacio salutis la kongreson ĝia unua vicprezidanto Drahomír Kočvara. (k)

---

LA FAMA ROMANO DE B.APTIZ "Nuda interlupoj" tradukita jam en 18 lingvojn, aperos baldaŭ ankaŭ en Esperanto, sciigas PACO, la eldono de GDR, n-ro 4/72. La numero entenas i.a. legindan pritrakton de D.Blanke pri interlingvistikaj esploroj.

# ESPERANTO OKDEKKVINJARA

La 26-an de julio 1887 aperis en Varsovio la Unua Libro de d-ro Esperanto, lernolibro de la internacia lingvo por rusoj, kiu baldaŭ altiris atenton de la unuaj adeptoj.

Depost tiu ĉi momento jam pasis 85 jaroj kaj la lingvo, kreita de Zamenhof, disvastiĝis tra la tuta mondo. Mankas la loko por elkalkuli nur la plej evidentajn rezultojn de Esperanto atingitajn "sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj", kiel akcentas la fama rezolucio de UNESKO el 1954.

Ĉu Esperanto progresas, demandas ofte ne nur skeptikuloj, sed ankaŭ adeptoj el la "propra" rondo, kiuj ne trovis en si mem sufiĉan fervoron por la afero... Kaj ili, la dubemuloj kaj malaktivuloj, fariĝas pli granda bremsilo de la movado ol malpravaj kritikantoj de ekstere. Esperanto (kaj ne nur ĝi !!) havas ankaŭ hodiaŭ multegajn kontraŭulojn. Sed nur idealismaj naivuloj povus deziri senkonflikta evoluon de iu ajn ideo aŭ movado, ne havante emon kaj forton por kontraŭargumentadi. Se ni rerigardas la lastajn du-tri jardekojn, Esperanto certe progresis - kaj ĝi konstante progresas laŭ sia aplikado kaj rolo en la socia vivo. Tiu ĉi rolo estos des pli efika, ju pli la esperantistoj klopodos pliakiviĝi.

Okdekkvin jarojn longa historio de la internacia lingvo estas unue la garantio por ĝia plua evoluo, due stimulo por nia venonta laboro. (knl)

## Jubileo de Miloš Lukáš

Poligloto, klasika filologo kaj konata tradukisto precipe el la estona lingvo, aŭtoro de ties lernolibro, membro de la internacia komisiono por la Belartaj Konkursoj de UEA, prof. Miloš Lukáš el Hradec Králové, ĝisvivas la 5-an de septembro sian 75-an jaron.

Lia Esperanta kariero komenciĝis definitive en 1911. Dek jarojn pli poste jam aperas lia E-traduko de "Nokto en Karlův Týn" de J. Vrchlický. Inter la du mond-militoj M. Lukáš kunlaboris al diversaj E-gazetoj, precipe al Literatura Mondo, redaktata de K. Kalocsay. Li estas aŭtoro de la ĉeĥa versio de la Zamenhofs poemaro kaj esperantigis la novel-kolekton de J. Drda "Muta barikado".

En la jaroj 1949-1951 prof. Lukáš deĵoris kiel komisiito por Esperanto en la ministerio de informado kaj klerigo. Katedro de E-o en Bolonjo, Italio, nomis lin sia honora membro.

Al nia renoma tradukisto kaj filologo ni deziras okaze de lia vivjubileo multe da prospero kaj sano. (k)

### ANTAŬ 25 JAROJ FORPISIS S.K. NEUMANN.

La 28-an de junio ni rememoris la 25-an datrevenon de la morto de Stanislav Kostka Neumann, granda revolucia poeto ĉeĥa, kunfondinta membro de EK en Praha kaj ano de ĝia unua komitato.

## JUNULARO REGAS EN "SET"

Raportas inĝ. E. Felix

En la 1-a etapo de la jubilea 20-a Somera E-tendaro en Lančov ĉeestas entute 135 personoj, el kiuj 110 gelnantoj kaj 14 geinstruantoj konstituas kvar A-kursojn, kvar B, du C-kaj 1 D-kursojn. Unu A-kurso estas plene dediĉita al 10 infanoj malpli ol dekjaraj (gvidas s-ino M. Juřenová). La plimulto kaj de la gelnantoj kaj de la geinstruantoj estas junularo inter 15 kaj 25 jaroj. Tendarestro s. Dvořák, la instruista "ĉefo" estas inĝ. V. Kočvara.

Partoprenas ankaŭ alilandanoj el Aŭstrio (2), Bulgario (4), Danlando (2), Nederlando (4) kaj GDR (1). S-ano Ĥesapčiev el Bulgario enviciĝis inter la instruataron per sia rektmetoda instruado helpe de bildoj.

La malnovaj SET-anoj estis agrable surprizitaj de pluj 5 kabanetoj kaj novaj kuirejoj kaj lavejoj, konstruitaj kaj parte ankoraŭ finkonstruitaj fare de la sinferemaj anoj de la EK Třebíč sub la gvido de la nelacigeblaj P. Sittauer kaj F. Sedláček. Al la 2a etapo aliĝis jam 90anoj.

ĈIUJN SERIOZAJN INTERESATOJN ni ankoraŭfoje atentigas pri daŭra ebleco partopreni en la literatura konkurso de STARTO (1/72, pĝ. 6). Sendu viajn konkursaĵojn en 4 ekzempleroj ĝis la jarfino 1972!

# NI HAVAS KANONON

La ekzisto de "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" /PIV/ estas jam dujara fakto. Unu el la plej detalaj kaj trafaj recenzoj pri PIV verkis Docento Ebbe Vilborg, membro de Akademio de Esperanto, kaj la sveda "La Espero" /4/71/ publikigis ĝin sub la supra titolo sur kvar paĝoj. Ĉar apenaŭ iu en nia lando povos fari tian pretendo-plenan laboron, ni decidis konigi al nia legantaro ekstrakton el tiu detala laboraĵo, plena de interesaj rimarkoj, kaj tiel montri, kiel ni rigardu PIV antaŭ ĝia ekuzo kaj kiel ni uzadu ĝin.

La "Plena Ilustrita Vortaro" estas la plej granda Esperanto-vortaro aperinta. Ĝi estas eĉ la plej ampleksa vortaro entute en la interlingvistika kampo (1300 + 36 paĝoj, 20x14 cm, eld. SAT 1970, presita ĉe The Blackburn Times, Britio). La manuskripto enhavis ĉ. 15 250 artikolojn (radikojn).

PIV estas kombino de du vortaregoj: la ĝenerala, por kiu respondecas prof. G. Waringhien, prezidanto de Akademio de E., kaj la faka, kies multajn partojn verkis diversaj specialistoj kaj kies tuton organizis R. Haferkorn, direktoro de la sekcio "Teknika Vortaro" en la Akademio. La listo de la fakoj reprezentataj per specialaj sekcioj ampleksas ne malpli ol 77 (Waringhien aperas sub 25 fakoj!).

Estas necese akcenti, ke PIV ne havas akademian sankcion, kvankam la prezidanto de la Akademio estas ĝia ĉefaŭtoro. Mi (Vilborg) estas ano de la Akademio depost 1963, kaj mi povas konstati, ke la akademianoj dum tiuj jaroj de finpretigo estis demandataj pri neniu detalo en PIV; ni eĉ ne estis informataj pri la ekzakta aranĝo de la laboro.

La laŭalfabeta ordo estas strikta kaj pli ekzakta ol en FV (Plena Vortaro de E). Oni ne uzas majusklojn por indiki oficialecon de la radikoj. Estas indikataj la diversaj signifoj de ĉiu unuopa vorto (la epoko de unusenceco estas jam malproksima!). La aŭtorsignoj estas mirige malmultaj: Z (Zamenhof), G (Grabowski), B (Bein), K (Kalocsay), X (Malnova Testamento), N (Nova T.). Ĉu vere ne iu pli moderna meritus esti citata? La difinoj de la vortoj estas pliprecizigitaj, rilate al FV. PIV ofte tiel amplekse difinas, ke ĝi estas uzebla kiel enciklopedieto. La ekzemploj en PIV estas pli bonaj kaj malpli torditaj ol tiuj en FV. Ofte estas necese legi multajn ekzemplojn antaŭ ol trovi la ĝustan prepozicion, la adekvatan verbon... Oni povas kompreneble respondi, ke Eo estas tiel riĉa lingvo, ke ne eblas ĉion tian registri. Kelkaj el la radikoj de FV malaperis en PIV: amiantio, artikuloj, cikloido, ĵako, komatulo... Rimarkeble diferencas FV kaj PIV rilate gramatikan karakteron de radikoj. Kelkaj formŝanĝoj ankaŭ okazis: akro (en FV) fariĝis akreo, dermito-dermatito, ekspozi-eksponi, komao-komato.

Kio donas apartan karakteron al PIV tamen estas la alfluo de novaj radikoj nekonataj en FV. Tiujn novaĵojn ni povas klasifiki jene: 1) Z-aj vortoj preteratentitaj en FV, 2) Modernaj vortoj internaciaj jam vaste disvastigitaj: aerogramo, aerosolo, astronauto, engaĝi, jeto.., 3) Grandega nombro da sciencaj kaj teknikaj fakterminoj, 4) Waringhien volis riĉigi nian lingvon sur la kampo de la ĉiutaga vivo, kie ĝi estas malmulte praktikata. Li tial enmetis centon da radikoj markitaj per "N" (=neologismo por ĉiutagaĵo). Oni do uzus ilin kun prudento kaj al la jam sperta publiko! Ni citu kelkajn: bobelo-bublina, burso-měšec, devanci-předhonit, febla-slabý, glebo-hrouda země, cis-před(místně), kibico-kibic, kiĉo-kýč, kirko-kostel, kompano-kumpán, lukri-vydělávat(prací), sinistra-levý, skoldi-hubovat, peskovat, temerara-smělý. Tre heterogena listo: apud vortoj kun sufiĉe granda internacieco aperas vortoj bazitaj sur unu nacia lingvo. Ankoraŭ pli miksitaj estas la vortkategorio "poeziaj terminoj". Mankas konsekvenco en la sistemigo: sordida(špinavý) estas poezia, sed timida(ostýchavý) estas ĉiutagaĵo; pigra(lenivý) estas poezia, sed magra(hubený) ĉiutagaĵo. - PIV riskas senesperige konfuzi la lingvouzon sur tiu ĉi grava kampo de ĝeneralaj neologismoj. Dum enestas "adasismo", mankas la terminoj "atismo" kaj "itismo", uzitaj milfoje dum la pasinta jardeko. Struta politiko!

Pri la materialo en PIV necesas fari gravan rezervon : en PIV troviĝas multo, kio ne estas Esperanto - nuraj proponoj, preferoj kaj idiosinkrazioj de la ĉefaŭtoro : estiel (kiel), nen(neniu), la kondicionalaj participoj -unt- ("Ĉe perfidanta sin mi volas mia" - kiu komprenu tion?), -ut- ("La ofenditoj pardonu!") - En geografiaj nomoj : PIV preskribas Izraelio (Israelo), Vjetnamo kontraŭ la VJETNAMIO de la esperantista popolo ktp. En baptonomoj esperantigitaj : se ni havas Johano, ni bezonas nenium Jano. Same ni malakceptu la mallertajn francismojn : Jakvo(Jakobo), Luizo(Ludoviko), Gulielmo(Vilhelmo). Georgino cedis en PIV al Georga, Sapfo fariĝis Sapfoa (!)... La nomaro favoras Europon kaj precipe Francujon. - (El "rimarkigoj pri unuopaj vortoj" de Vilborg ni elprenu) : epsil/a, upsil/a estas neakcepteblaj formoj por la grekaj literoj E,Y : kial-a?, kial ne epsilon/o, ipsilon/o ?

Preseraroj preskau mankas, kaj mi ne povas ne esprimi ankoraŭfoje mian admiron al la presistoj kaj la preskontrolantoj. La bildmaterialo estas kolektita fine de la libro sur 30 platoj.

F i n k o n k l u d o : PIV, per sia kompleto kaj ekzakteco, inaŭguros novan epokon en la vivo de nia lingvo. Sopire atendita dum multaj jaroj ĝi donas bazon por estonta evoluo de la internacia lingvo kaj forigas la necertecon pri la ĝisnuna atingado de nia vortprovizo. Materiale ĝi reprezentas kompromison inter registra kaj preskriba vortaroj; bedaŭrinde oni devas konjekti, kie ĝi preskribas. Sendube ĝi, montrante la enorman potencialon de Esperanto, konfirmas la pozicion de tiu lingvo kiel la sola rivalo de la grandaj naciaj lingvoj por la rolo de internacia komunikilo.

Tiom Doc.E.Vilborg, Ak., pri "PIV".

Mi aldonas : dum la vortaro enhavas ankaŭ nenecesajn vulgaraĵajn terminojn, kiujn eĉ grandaj naciaj vortaroj evitas, mankas tie iuj terminoj aŭ tre bezonaj, aŭ jam sufiĉe aplikataj internacie. Ekz. por "biĵuterie" (Hromada: biĵuterio); por "trolejbus" enestas "trolea autobuso" (Hr.: trolebuso). Estas ignorata la jam internacie kutima "hobio" (koniček) kaj estas trudata, mi emus diri "pompidueske", la nekonata francismo "maroto" (marotte=podivínství, bláhovost, koniček).

Nin en Ĉeĥoslovakio plej tuŝas la geografiaj nomoj nin rilatantaj. Waringhien disrevigas nin per ignorado de la oficiala nomo de nia ŝtato, nomante ĝin sole "Ĉeĥo-Slovaka Popoldemokratia Federacio" !! (la majuskloj indikas verŝ. alian opinion, ke tio estas la o f i c i a l a nomo!). La samo ripetiga sub "Prago", sed ellasita estas la "Popoldemokratia". Dum sub "Morav-" troviĝas ĝusta "Moravio", sub "Ĉeĥo" ni renkontas la nepre senbazan "Moravujo". Soka por la ĉeĥoj estas la signifo donita de W. al jenaj terminoj : bohemo-vivmaniero, en kiu malŝatataj estas sociaj konvencioj, regulaj okupoj k severaj moroj : la Montmartra, la Soĥa bohemo ; bohemiano : artisto aŭ pseudoartisto, vivanta bohemie. (Hromada: boemo, boemaro - bohém, bohéma). Neĝusta estas la konstato, ke Bohemio estis reĝlando ĝis (nur) 17a jc. Kontraŭ la ĝisnuna uzmaniero, la komencliteroj de la nomoj de nacioj estas skribataj majuskle.

R e s u m e : PIV estas sendube unu el la plej gravaj atingadoj por la E-movado, kiel cetere substrekas akademiano Vilborg. Sed ni ankaŭ sciu uzi ĝin : prudente (kiel Waringhien en la antaŭparolo mem konsilas), pripenseme, kritike, precipe ĉe la nove proponitaj neologismoj ! Ni do ne forgesu la konstaton de Doc.Vilborg: "Tiu ĉi giganta vortaro grandparte estas unuhoma verkaĵo, kaj respegulas la preferojn de unu persono". Kvankam pri la rezulto ekzistas la indikataj rezervoj, oni devas admiri la laboregon de G.Waringhien.

Jaroslav Mařík

Rim.de red. : la subskribinto estas i.a. kunlaborinto de la E.-ĉeĥa kaj ĉeĥa - Esperanta vortaro de R.Hromada kaj li lektoris la E.version de la Poŝatlaso de la mondo eldonita en Praha (1971).

## ČS. ESPERANTISTÉ ZA MÍR VE VIETNAMU A NA CELÉM SVĚTĚ (dok.z 1.strany)

Vedení mírové sekce opatřilo nebo doporučilo pomůcky pro většinu připravovaných akcí. Na některé vyslala sekce zástupce velvyslanectví a Informačního a kulturního střediska VDR, na jiné pak bývalého velvyslance ČSSR v Indočíně prof.V. Knapa. Několik akcí obsadili členové výboru sekce.

Vcelku byly docíleny tyto výsledky :

Bylo uspořádáno 237 různých akcí : přednášky s filmy a diapozitivy, besedy ve školách o dětech ve Vietnamu, večery solidarity, výstavy, relace v závodním, školním, místním a okresním rozhlase ; uveřejněny články o pořádaných akcích apod. Bylo darováno 46 000 listů tiskového a rozmnožovacího papíru, 3 070 sešitů pro vietnamské žáky a za 2 625 Kčs hraček pro vietnamské děti. Kromě toho peněžní dary ve prospěch vietnamského lidu v celkové částce 21 443,20 Kčs.

Kampaň "Čs. esperantisté bojujícímu Vietnamu" nutno posuzovat jako první větší ucelenou akci, v níž měli esperantisté vyjádřit svůj postoj a angažovanost v celospolečenských zájmech. Šlo i o to, aby prokázali na konkrétním a aktuálním příkladě životaschopnost EK a jejich praktický podíl na dalším rozvoji esperantského hnutí v naší socialistické společnosti. Ve většině případů se náš společný záměr opravdu podařil. Setkali jsme se však i s tradiční nezdravou, možno říci škodlivou, snahou výborů EK nebo jednotlivých členů, izolovat se od ostatního veřejného dění a stávat se sektou používající esperanta převážně k osobním zájmům, což nemá nic společného se skutečnými zájmy a cíli esperantského hnutí.

Na vietnamské kampani se jasně ukázalo, že EK, jejichž vedoucí činitelé pochopili základní principy současné popularizační a organizační práce, ale i požadavky kladené na zájmové a společenské organizace, dokázaly vyzvednout své společenské postavení a význam v místě svého působení do té míry, že např. při organizování vietnamské akce hrály "první housle". Byly to mj. EK v Boru, Ústí n.L., Jablonci n. N., Mělníku, Opavě, Ostravě, Teplicích, Olomouci, jejichž činnost vysoce ocenili vedoucí činitelé orgánů NF, NV, ROH a některých dalších institucí, a v některých případech ji dávají dokonce jako příklad pro ostatní organizace v místě. O jedné z těchto EK budeme psát v příštím čísle.

Je jistě úspěchem, že spolupořadatelé akcí EK byly okresní a místní orgány a organizace NF, krajské a okresní mírové rady, ZK ROH, kulturní a společenská střediska, knihovny a některé odbory školství ONV, které převzaly nad akcí svou záštitu. Je to důkaz, že účelně zaměřená činnost najde porozumění a podporu u těch nejpovolanějších.

Závěrem je třeba znovu připomenout, že v uplynulých měsících nešlo jen o samotnou pomoc čs. esperantistů vietnamským přátelům. Svou akcí jsme chtěli proniknout do veřejného života v místech a na závodech, a tam, na praktickém příkladu vietnamské otázky šířit humanistické, všelidské a internacionální cíle esperantského hnutí. A nejen to. V průběhu kampaně jsme mohli na názorných souvislostech znovu a znovu dokládat známou skutečnost, že boj za mír ve Vietnamu je bojem za mír i v ostatním světě, že je bojem proti světovému imperialismu, v jehož čele stojí agresivní síly Spojených států.

Tentokrát to byla kampaň na pomoc Vietnamu. Poskytla nám dobrou příležitost k účinnému uplatnění a šíření našich idejí a přinesla mnohé zkušenosti pro přípravu dalších akcí, ať již budou z dávanější bližší nebo vzdálenější zaměření esperantského hnutí.

Morálně, politicky a lidsky nás k tomu zavazují dvě základní skutečnosti : příslušnost a odpovědnost k československému a mezinárodnímu esperantskému a mírovému hnutí, které se stalo naším životním cílem, a k naší socialistické vlasti, v níž žijeme.

Tomáš Balda

---

KUN ONKLO HO. Eld.Fremdlingva Eldonejo,Hanojo,1972.- "Neniu biografo povus revivigi rimarkindulon tiel riĉan je kvalitoj, kiel Ho Chi Minh". La aŭtoroj de la 400-paĝa libro kolektis la dokumentojn de tiuj, kiuj havis la okazon labori kun tiu ĉi fama politikisto kaj skizis la portreton de la homo, kiu restas por la tuta vjetnama popolo Onklo Ho.

Tiujn ĉi vortojn enskribis en la libron dediĉitan al mi Oscar Otero, juna gvidanto de la havana esperantistaro. Kun li kaj René Valdés mi pasigis, kiel unua eksterlanda vizitanto esperantista en Kubo, multajn neforgeseblajn momentojn en tiu ĉi belega lando, kie mi restadis en aprilo-majo je la invito de la tiea ĵurnalista asocio.

La kuba E-movado renaskiĝis nur antaŭnelonge. Ankaŭ ekster Havano aktivas unuopuloj en kelkaj urboj kaj urbetoj. Ili bone konscias pri sia tasko, popularigante kaj praktikante la Internacian Lingvon en siaj labor-medioj. Tio evidentiĝis en la laborejoj de ambaŭ miaj amikoj, kie ili jam sukcesis "plugi" la grundon por la afero. Laŭ sia lingva prepariteco la gvidantoj de la Havana E-Rondo staras almenaŭ tiom alte, kiom tiuj en la landoj kun "evoluinta" movado.

Miaj amikoj malfermis al mi siajn hejmojn, venigis siajn familianojn, oferis por mi sian liberan tempon. Jam de kelkaj jaroj ili korespondas kun esperantistoj el Ĉeĥoslovakio. Kortuŝite mi aŭskultis pri ilia eksterkutima ŝato por nia patrujo kaj povis konstati, ke ili estas informitaj pri ni ankaŭ dank al Esperanto.

Iam en Japanio la ĉefurbaj gejunuloj montris al mi tutan ĵarkolekton de STARTO en sia klubo biblioteko. Nun - sen supozoj - mi renkontiĝis kun la legantoj de la sama gazeto ankaŭ en Havano.

Nu, kia miro, ke ni estas jam malnovaj amikoj!

O.Kníchal

## Ok mielaj tagoj en Rimini

Jam la dekan fojon okazis en la ĉarma ĉemara urbeto Rimini, Italio, la fama aranĝo "Miela Luno", organizita propagandcele kaj senpage de Turisma Entrepreno kaj de la Asocio de la Hotelestroj en Rimini. Inter 42 novgeedzaj paroj el dek eŭropaj landoj estis tri esperantistaj: Janina (polino) kaj Wouter (nederlandano) PILGER, vivantaj en Nederlando, Ewa kaj Marian DOBRZYNSKI el Pollando kaj ni.

Komforta dulita ĉambro en la luksa hotelo Excelsior Savoia kun grandaj fenestroj, tra kiuj ni rigardis la proksiman maran spektaklon, estis la unua tre agrabla surprizo flanke de niaj gastigantoj. La oktaga programo estis tre interesa: akcepto ĉe la urbestro, Fiatautomobila parado, ekskurso al San Leo kaj San Marino... Ĉie estis por ni preparitaj refreŝigaj bongustaĵoj kaj niaj edzinoj kelkfoje ricevis belegajn rozojn kaj aliajn donacetojn. Okazis du konkursoj - la fotografa por la edzoj kaj florarango (ikebano) por la edzinoj. Ĉe la adiaŭa dancvespero en la plej luksa hotelo "Grand" estis anoncita la plej sukcesa paro - ĉijare la itala.

Ni trarigardis ankaŭ la urbon mem kaj ĝiajn historiaĵojn, vizitis monaĥejon de pastro A.Ciccanti, motoro de la loka E-klubo kaj la Esperanto-centron, renkontiĝis kun la esperantistoj en Riccione, kie nin akceptis direktoro de la tiea turisma entrepreno kaj ni sukcesis trovi ankoraŭ tempon por bani nin kaj sunumi.

Ok tagoj rapide pasis kaj vole-nevole ni devis adiaŭi la simpatian lokon, la ceterajn parojn, P.A.Ciccanti kaj la aliajn. Ankaŭ Italion, ĉar el Rimini ni vojaĝis per trajno rekte al Vieno. (Antaŭe ni restadis unu semajnon en Piso, Florenco, Romo, Vatikano kaj Napolo).

En la aŭstria ĉefurbo helpe de f-ino Stamm ni vizitis la Internacian E-muzeon kaj rigardis kelkajn lokojn, i.a. la monumenton de D-ro L.L.Zamenhof. Esperanto kaj la esperantistoj multe helpadis nin ĉie dum nia vojaĝado.

Sylva kaj Pavel Polnický

---

KORESPONDI DEZIRAS: Edgar MOLLER, 31j.lab., 27 Schwerin, DDR, Dr.Hans-Wolf-Str. Pri turismo, folkloro • Paskalius GARUDIS, H.Beimlerstr.117, 90 Karl-Marx-Stadt, DDR. • Sian novan adreson sciigas Anja VOJNAROVIČ, 353860, Priatovska poŝto, Primorsko - Ahtarska rajono, Krasnodarska lando, USSR • Sabino Pelegrín COLOMO, 23j.stud. pri kemio, San Vicente Mártir 24, Zaragoza, España.

## Rondeta vivo

**B R N O** - La klubo gastigis 16-membran grupon de hungaraj esperantistoj (28-305); kelkaj geklubanoj ekskursis kun ili al la apudurbaj vidindaĵoj. La 29.5. oni aranĝis amikan kuneston, kiun abunde vizitis EK-anoj.

**M Ě L N Í K** - Riĉan programon preparis la tiea E-junularo por siaj polaj amikoj en la havenurbo Gdynia. La gaja vespero okazis la 3-an de julio en la esp. klub-ejo, Gdynia.

**P R A H A** - La 26-an de marto oni elektis novan komitaton de EKP kun prezidanto ark. J. Drlík kaj vicprezidantoj A. Bartošík, A. Slanina kaj d-ro R. Horský.

Instruistino M. Juřenová prezentis la 6an de junio sian modelan laboron kun infanoj, improvizinte kun la tuta 1-a klaso E-instruhoron, en kiu i.a. estis prezentita drammaniere la fabelo "Avo plantis beton". (En "Večerní Praha" aperis 26.7. ampleksa raportaĵo pri peresperanta aktiveco de M. Juřenová).

La 27-an de junio vizitis EKP red. de HEROLDO s-ino Sikorska kun sia edzo s-ro Fighiera kaj la japana samideano Sumija. Pri sia restado en Kubo parolis O. Kníchal.

## Samideana kroniko

23.7. ĝisvivis 65 jarojn Antoni S e e m a n n a, unu el la kolonoj de la estinta teatra kolektivo de EK en Praha, la "Verda Ĉaro de Julio Baghy", kiu reprezentis unu el la plej altnivelaj kulturaj ating-aĵoj de Esperanto en ĈSSR.

En Stonava mortis la 9.3.1972 en la aĝo 75 j. Pavel B u b i k, fondinto kaj la unua prezidanto de ER en Stonava. Honoron al lia memoro!

Geedziĝis 1.7. en Kroměříž Irena Fránková kaj Marek S v ě t l í k. Niajn gratulojn!

## POŝTISTOJ AL KUNLABORO!

La 26-an de julio okazis en Szeged konferenco de la Internacia Poŝtista Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA) kun la sidejo en Sofio. Por unuigi ties fortojn ni devas turni nian atenton al la informa laboro kaj klopodi konatigi fakajn novaĵojn el la tutmondo. Oni povas anko-

raŭ abonon la organon de IPTEA "Interligilo" por 1972. Ĉiuj konvenaj sugestoj estos laŭeble represitaj en ĝi.

Ni atendas viajn baldauajn sciigojn, esperante, ke neniu PTT-isto preterpasos la okazon almenaŭ koncize respondi al la perantino por ĈSR: Marie R a c k o v á, Kyjevská 15, Plzeň.

## INFORMILO DE TS KUN VORTARA ALDONO

En la lasta (7-a) n-ro de la cirkulero de la Teknika sekcio ĈEA ekaperis konstanta rubriko de vortaretoj kies celo estas prezenti interesajn fakvortojn, fakajn esprimojn kaj frazeologiaĵojn ne troveblajn en ordinaraĵoj vortaroj. Ĝi volas esti "provdalono" de la preparata teknika vortaro ĉeĥa-Esperanta. La informilon mendu por EK ĉe la sekretario de TS, ing. J. Werner, Kroftova 84, Brno.

## MEDALOJ POR E-FILATELISTOJ

Unu orumitan kaj unu arĝentan medalojn gajnis la membroj de ĈEA okaze de la ekspozicio de poŝtmarkoj en Trenčín, junio 1972. La unua estis aljuĝita al s-ro D. Bartošík el Praha por lia kolekto "El la historio de la internacia lingvo Esperanto", la dua, arĝenta, venis al V. Hasala el Hodonín por la kolekto "Esperanto en filatelo".

KONTAKTOJ PER KORESPONDADO. Lernejoj k klasoj, kie oni instruas Eon fakultative aŭ en studrondoj kaj kiuj konsentas kontakti la gelnantojn el Estonio, skribu al ESTONA SOCIETO POR AMIKECO KAJ KULTURAJ RILATOJ KUN EKSTERLANDO, Esperanto-Komisiono, Tallinn, Weizenbergi 39, p.k. 94. - En Estona SSR Eo estas fakultative instruata en dudeko da lernejoj.

SE VI DEZIRAS PROGRAMOJN EN E-O, vi e-fike povus influ la aŭtoritatojn en la sveda radio, skribante mallongan leteron aŭ p.k. al s-ro Bengt Jaerrel, Dir. de RS-progr., S-105 10, Stokholmo, Svedio.

S T A R T O - eldonas Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p.k. 8, Praha 2. Aperas okfoje jare. Respondeca redaktoro Oldřich Kníchal. Red.komitato: ing. E. Felix, J. Mařík, ing. F. Sviták. Abonebla sole por la asociaj membroj. - Dohlédací pošta Praha 07, sniž. pošt. poplatek povolen ŘP Praha j. zn. P/1 - 2283/1971, dne 6.5.1971.